

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
septembro 2007

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Elektitaj Prepozicioj

“Mi staras sub la laŭbo kiu rondiras la subĉielan dancejon; mi estas kun amikoj kaj parencoj de la dancantoj, kiuj ĉeestas por subteni ilin. La tero vibras pro la sono de la tamburoj dum ni dancas per paŝetoj, sen ŝanĝi niajn poziciojn, sentante la korobatadon de la tero mem. Ĝi pulsas tra niaj piedoplando kaj trafluas nin, ĝi unuiĝas kun niaj koroj.”

Tiel la neindiana verkistino Sandy Johnson priskribis momenton dum sia partoprenado en la “sundanco” de la Indianoj Lakotaj de Usono.

Tiu citaĵo ŝajnas grava pro (almenaŭ) du kialoj interese kaj forte ligitaj:

---Ĝi pensigas nin pri la kuneco de vivo premisita en multaj indiĝenaj kulturoj

---Ĝi komunikas la rilaton kiun multaj indiĝenaj kulturoj perceptas specife inter la homaro kaj la Tero.

Du-vorte—KUN kaj INTER. Ni kiuj celas labori por indiĝenaj rajtoj laŭeble KUNlaboru por pli efikaj rezultoj kaj konstruu ligilojn INTER Projekto Indiĝenaj Popoloj kaj similcelaj organizoj, kaj INTER PIP kaj indiĝenaj grupoj. Tiel, ankaŭ ni sentos pli profunde la korobatadon de la Tero.

El “Mia Kuzo”

Dume,

mi feliĉas nur tamburadi dum vi

krias tiujn

malnovajn vortojn

kiuj resaltas de la flankoj

de reservejaj aŭtoj

kaj cervoledaj virinroboj (...)

Vortoj tiom fortaj

ke ili klakigas niajn korojn

kaj

altigas niajn plumornamaĵojn

super niajn kapojn.

Tiom dolĉaj

ke ni ekploretras pro la mortintoj.

Tiom ĝustaj

ke ni eble

re-amos denove amititojn.

(Verkis [s-ro] Ben-Alex Dupris. La poemon aperies en la usona, indiana revuo Red Ink [Ruĝa Inko], volumo 13, numero 1.)

Kanue al la nuno...kaj al la estonteco

El komentoj de Peter Djigirr, enscenigisto de la Aŭstralia, aborigenlingva filmo Dek Kanuoj.

Ni estas el la tero. Homoj, blankuloj, ĉiam venas, ministoj kaj similaj, kaj ni ĉiam neas ilin, ĉar ni ne deziras perdi nian kulturon. La vivmanieron de la blankuloj detruas nin.

Ni havas niajn leĝojn el praaj tempoj, gravaj leĝoj pri ĉio. Sed pli kaj pli da tiuj blankuloj venas kaj ni ne povas resti en nia leĝaro. Ĝi simple malpliigās. Se ni daŭre perdos nian leĝaron, blankuloj povos komenti al ni, "Kie estas via kulturo? Ĝi estas nenio, vi perdiĝis, ega malbonŝancaĵo por vi."

(....)

Ni penos plifortigi nian atenton al tiu leĝaro per tiu ĉi kinofilmo, por ke ili agnosku, "Ho, tiu gento ankoraŭ havas por si tiun leĝaron, kulturon, kaj similajn viverojn."

Agrara Revolucio

El intervjuo kun (s-ro) Evo Morales, unua indiĝena prezidento de Bolivio, kiu aperis en la magazino Americas, aŭgusto 2007.

Intervjuisto: Diru al ni pri agrara reformo.

Prezidanto Morales: Plej grave, ĝi celas ĝustigi historian neegalecon pri terendistributado. La koncentriĝo de terenoj kaj la grandegaj bienoj estas eroj de la ekskludado kaj diskriminacio kiujn indiĝenaj popoloj kaj kamparanoj nun travivas en la kamparo kaj sovaĝejoj de Bolivio.

Post la Agrara Reformo de 1952, oni distribuis 32 milionoj da hektaroj el tereno al 40.000 mezgrandaj aŭ grandaj entreprenoj, kaj pli ol 500.000 indiĝenaj kaj kamparaj familioj ricevis proksimume kvar milionoj da hektaroj. Ni proponas Agraran Revolucion kiu permesos ke ni eksigu la grandegajn bienojn kaj regajnu la terenojn kiuj ne produktiviĝas, alivorte, kiam ili ne konformiĝas kun sia ekonomia kaj sociala funkcio laŭ la Konstitucio. Ĉiujn tiujn terenojn kiujn oni akaparas por spekulaj kialoj aŭ kiujn posedas grandskalaj bienistoj devas ekposedi kamparanoj aŭ indiĝenaj bienistoj kiuj suferas malabundon de tereno por produktado, kaj kiuj sin vivtenas nur per nutraj plantoj kiujn ili povas kultivi familie aŭ komunume.

Paragvaja Bongustaĵo

Kanto de la Farado de la "Ĉipa" (paneca manĝaĵo en Paragvajo). Verkinto nekonata. Tradukita al Esperanto el hispanlingva traduko de poemo gvarania.

Tokitó kitó, tokitó kitá*

Ĝis tie oni aŭdas la sonon de la pistujo,
jam troviĝas feliĉo, per pistado dupersona;
per la peza pistilo oni faras girodancojn.
(...)

Ovojn al mi donu, maizon muelitan,
grason kaj fromaĝon, lakton kaj salon;
homoj venu, venu por vidi,
la varmega bakujo kvazaŭhurlas,
la brulligno parolas, la bakfajro dancas,
la fumo flugas, la cindraro rulas.

Tokitó kitó, tokitó kitá*

Venu rapide, ĉiuj venu,
plibeligu vin, ridu ĝoje,
estu feliĉaj, la "ĉipa" manĝopretas.
Onomatopejaj esprimaĵoj por reprezenti la sonojn de maizopistado.

Transnacia Edukado

Denove ni vizitas la Manifeston de Prago, grava dokumento de 1996 kiu helpas priskribi Esperanton kaj esperantistojn. Jen la dua ero de la manifesto:

"Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio, kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas

Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

“Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.”

Certe, ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Same ligita estas ĉiu persono. Mi forte dubas ĉu la manifestintoj sciis kiel estus kreski kaj vivi sen “difinita kulturo,” do la valoro de tiu kritiko ŝajnas eta.

Tamen, oni povas diri ke grava celo de edukado kaj larĝeco de kulturo estas konigi al persono kiu estas ligita al difinita kulturo la ekziston kaj valorojn de aliaj kulturoj, kaj la plenan homecon de la personoj ligitaj al ĉiuj kulturoj. Ni nepre komencu la kulturajn vivojn de niaj infanoj per difinita perspektivo pri la mondo, ĉar ĉiu infano serĉas kaj bezonas tian perspektivon. Poste, ni uzu Esperanton kaj aliajn ilojn por konstrui pontojn: menso-plilarĝigajn pontojn, kultur-pliriĉigajn pontojn, mondo-maldetruajn pontojn...per kiuj ni povos vojaĝi al aliaj kulturoj, inter ili la kulturoj de indiĝenaj popoloj. Poste, ni revenu por denove evalui kaj laŭbezone aliigi niajn vidpunktojn kaj niajn ligilojn al niaj propraj kulturoj. Jen eblecoj por sana, kreema, internacia vivo.

Ni Estas Ĉiuj Indiĝenoj

(Mesaĝo de Renato Corsetti, eksprezidanto de Universala Esperanto-Asocio)

Indiĝenoj estas, laŭ la nunaj ideoj en la internacia komunumo, grupoj, kiuj loĝas en sia teritorio de longa tempo sed troviĝas en ekonomie, socie, kaj kulture dependa pozicio.

La teritorioj, en kiuj indiĝenoj loĝas, estis antaŭ longa tempo ĉirkaŭitaj de pli potencaj fremduloj.

Esperantistoj okupiĝas pri indiĝenoj, ĉar ili okupiĝas pri malfortuloj ĝenerale. Ili emas defendi la nedefendebajn kaj nedefendatajn kaŭzojn.

Aliflanke la tuta mondo en la nuna momento riskas iĝi “indiĝena”. Homo naskiĝinta en Italujo kaj daŭre vivinta ĉi tie ne havas pli da decido-povo pri sia destino ol foraj, multnaciaj kompanioj, kiuj decidas kion li devas manĝi kaj kion li devas regardi en la televido, kaj kion li devas legi, ktp. Tiuj kompanioj eĉ ne diras al li kion ili decidis, kaj ili tute ne respondecas al li sed nur al siaj akciuloj.

Praktike ankaŭ tiu italo, kiel homoj en ĉiuj aliaj landoj, iĝis indiĝeno de la mondo.

Tamen jam estas tempo ribeli kontraŭ la procedoj, kiuj indiĝenigas nin. Esperanto estas unu el la iloj por batali kontraŭ tiu procedo en la kultura kaj lingva kampo. Pro tio ĝi taŭgas por rilatoj inter anoj de kiu ajn lingva grupo kiu devas interparoli kun ano de alia lingva grupo. Neniam estos plena egaleco por la tradiciaj kaj por la novaj indiĝenoj, se ili ne sukcesos trovi manieron por rilati inter la lingvaj baroj sed konservi sian lingvon kaj sian kulturon. Nur Esperanto permesas tion, ĉar ĝi ne emas mortigi aliajn lingvojn, kiel ĉiuj naciaj lingvoj uzataj inernacie faris dum la historio kaj en la nuna tempo.

Lernu Esperanton, se vi volas resti vi mem.

Senigo de Rajtoj kaj Popoleco

(Ĉi tiu artikoleto baziĝas je informoj provizitaj de Forest Peoples Project (Projekto por Arbaranoj).

Anoj de indiĝenaj grupoj en Rŭanda, Ugando, D. R. Kongo, Tanzanio, Kenjo, Kamarunia Respubliko, kaj Sudafriko raportis al PA /FPP la jenajn situaciojn relate je ili kaj la tereno kiujn ili kutime uzas:

---perfortaj elpeloj

---pliiĝo de diskriminacio fare de registaraj kaj aliaj grupoj

---perdo de identeco

---malĝusta traktado kompare kun grupoj kiuj celas arbosegadon aŭ nenecesan ĉasadon.

Arbaranoj nun devas kontraŭi ne nur arbosegajn kompaniojn, sed ankaŭ ne-registarajn organizojn kiuj celas ŝirmi terenojn per haltigado de vivtenocela ĉasado kaj kolektado de sovaĝaj plantoj.

En tiuj senigoj de vivorimedo ĉiaspecaj en pluraj landoj, oni vidas la komencon aŭ daŭrigon de la detruoj de kulturoj.

Por informiĝi plu, kontaktu: Forest Peoples Project, fppproject@forestpeople.org, 1c Fosseway Business Centre, Statford Road, Moreton-in-Marsh, GL56 9NQ, UK (Unuiĝinta Regno)

Kio Estas la Signifo de “Tik”?

(El recenzo [en la magazino Americas, aŭgusto 2007] de Bocas del tiempo [Buŝoj de la Tempo], verkita de [s-ro] Eduardo Galeano. Tradukis el la hispana al la angla [s-ro] Mark Fried.)

Indianaj komunumoj ne nur estas senvalorigitaj dum la aktuala erao; ekzistas nur malgranda deziro kompreni ilian lingvon aŭ iliajn kutimojn. Tio estas bone ilustrita per [la rakonto] “Tik”. Esploristo ĉeestas kunvenon en malgranda vilaĝo de indianoj Tzetsal-aj, kie li “komprenas nenion”. Tamen, li akre konsciiĝas de la ripetado de la vorto “tik,” kaj ritmo simila al la pluvosono. Fine li komprenas—kiel, verŝajne, okcidenta socio ankaŭ bezonas kompreni—ke la signifo de tiu Majaa vorto estas “ni”.

Solvo por Sendormeco

(Inuita kanto)

Mi ne povis dormi

ĉar apud mi la maro multe glatis.

Tiel, mi forpaelis,

kaj rosmaro surfaceniris

apud mia kajako.

Mi ne povis ĵeti, ĉar ĝi tro apudis,
kaj mi ŝovis mian harpunon en ĝian flankon,
kaj la ĉasflotilo resaltis akvosurface.

Sed la rosmaro plurokaze al la surfaco suprenvenis
kaj kolere pozis siajn palmopiedojn.

....

Kaj kiam ĝi retiris, forte blovante,
por denove koncentri sian forton,
mi alpadelis kaj mi lancis ĝin.

Kaj ĉi tion mi prikantas
ĉar la homoj kiuj loĝas
sude kaj norde de ni
plenigas sian spiradon je sinlaŭdo.

Fin-notoj:

La citaĵo el La Manifesto de Prago kaj la artikolo de Prezidanto Corsetti aperis originale en Esperanto. Ĉiujn aliajn tradukitajn bultenerojn esperantigis el la angla aŭ la hispana (s-ro) Erik Felker.

PIP nun sendas aktualajn numerojn de La Kalumeto, en la angla aŭ Esperanto, al elektitaj fakoj de universitatoj, al ne-registaraj organizoj, kaj aliaj organizoj kiuj celas apogi indiĝenajn popolojn. Se vi havas sugestojn por la plibonigo de nia bulteno, se vi volas ke ni sendu ĝin al iu persono aŭ grupo, aŭ se vi havas artikolon, tradukon, aŭ similaĵon por aperigado en la bulteno, bonvole kontaktu:

Erik Felker

ejfelker@dslextreme.com

aŭ

414 E. Cedar Ave., Apt. 11

Burbank, CA 91501

U. S. A. / Usono